

Kulturaj Kajeroj

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

Simpla : 25 fkoj
Bonfara : 30 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes
P.Ĉ.K Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pago 4)

SEPTEMBRO - OKTOBRO

1975 5

KULTURAJ KAJEROJ

1975 SEPTEMBRO - OKTOBRO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jean-Paul Guillot, 21, rue des Aubépines
86 - Poitiers

Komitatanoj :

Pierre Babin
Pierre Chevalier
Simone Guillot

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

El Grésillon

Esperanto tra la mondo A. Frangeul

La grandaj damoj de la antikva Egiptujo

Du famaj aviadistoj, fervoraj esperantistoj E. Motillon

Prelegoj de Grésillon :

« Homo kaj maŝino »

Ventmueliloj kaj ventmuelejoj en la mondo L. Chasseriaud

Evolucio kaj sekseco de la plantoj

La unukornulo — fabela besto

Por via distro

KULTURAJ KAJEROJ
ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ
spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ
publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ
respondos al gramatikaj demandoj

KULTURAJ KAJEROJ
prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu ai vi. Sendu viajn sugestojn kaj kritikojn.

El Grésillon

Finita la somero ! Jam aŭtuno frapas ĉe la fenestro per rustiĝantaj fingroj. Ni devas pripense reveni kelkajn semajnojn pli frue, al Grésillon, por retrovi la sunon.

Ĉar la tuta somera sezono en Grésillon disvolviĝis en varma sunlumo, krom kelkaj atakoj de fulmotondro. Sub la suno, la partoprenantoj de la unua periodo ĉeestis la kursojn, la konversaciojn, partoprenis la aktivaĵojn de la esperantistaj instruistoj de la « Moderna Lernejo » — movado. En la ombro de la prelegsalono okazis la prelegoj de la dua periodo, sekvataj de kelkafoje tre viglaj diskutoj. Sub la suno denove grupiĝis la kursanoj de la tria periodo.

Kiom da personoj partoprenis entute ? Ankoraŭ ne eblas diri, sed certe iom pli ol lastan jaron, dum iom pli longaj periodoj. La nombro da partoprenantoj estis de 60 ĝis 120. Alilandanoj el 12 diversaj landoj vizitis nin, ĉefe germanoj. Tre ŝatata estis la partopreno de Ges-roj Mikulas el Hungario kaj de S-ino Formaggio el Italio, kiuj sindoneme helpis en la instruistaj aktivaĵoj. Tre ŝatata ankaŭ estis la prelegoj de S-ino Cheverry, de Ges-roj Grossman, de S-roj Boyet, Lloancy, Métivier, Mimo, Masclet, kaj la konversacioj pri la prezentitaj temoj. Atente ĉeestataj estis la kursoj de F-ino Turbillon, S-roj Babin, Boyet, Le Magadure, Lentaigne, Ribot. Grandan dankon ŝuldas al la kursgvidintoj kaj prelegintoj la grezijonaj sumerumintoj, kiuj havas multon por rakonti al siaj amikoj kaj samgrupanoj.

Konklude estas necese atentigi pri fakto ĉiujare pli konstatebla. La dua periodo titoliĝas « Internaciaj Semajnoj », sed ĝi ne estas multe pli « internacia » ol la aliaj. Ĉijare, dum la unua periodo ĉeestis ses diversaj nacioj, dum la dua naŭ, dum la tria denove naŭ. Ĉiuj periodoj fariĝis pli kaj pli internaciaj.

ATENTU

Kun granda malĝojo, ni anoncas al niaj fidelaj legantoj, ke ni estis devigataj forte plialtigi la prezojn de la jarabono al Kulturaj Kajeroj. Nur la plialtigo de niaj diversaj kostoj respondecas pri tio.

La novaj prezoj de jarabono estas :

— simpla abono : 25 frankoj

— bonfara abono : 30 frankoj

La nefrancaj legantoj bonvolu noti la novajn prezojn sur la dorsa flanko de la revuo, post la adreso de niaj landaj perantoj.

Ni esperas ke tiu kresko de la prezoj ne timigos niajn legantojn, kaj ke ili daŭre helpos nin per pago de la abonprezo por 1976.

Esperanto tra la Mondo ★

LA UNIVERSALA KONGRESO EN KOPENHAGO

1200 partoprenantoj el 45 landoj ĉeestis la 60 an universalan kongreson de Esperanto, en Kopenhago.

19 registaroj estis reprezentitaj oficiale, interalie de 4 ambasadoroj.

La dana ministro pri kulturo transsendis siajn salutojn al la kongreso. Prof. Peevsky reprezentis la tutmondan federacion de la sciencistoj kaj S-ro Knud Nielsen la mondajn federalistojn.

Oni ankaŭ legis mesaĝon de S-ro Amadou-Mahtar M'Bow, ĝenerala direktoro de UNESCO, dirante notinde : « Per la kontribuo, kiun ili celas fari al la celebrado de la Internacia Jaro de la Virino, la esperantistoj povos daŭrigi sur esence grava kampo, la laboron, kiun ili entreprenis por internacia kompreniĝo kaj interproksimigo de la popoloj ».

La jaro de la Virino estis efektive en parto de la tagordo de la kongreso, kiu disvolviĝis en tre bona atmosfero, kun la kutimaj eroj : debatoj, somera universitato, kunvenoj de multaj fakaj asocioj, literaturaj konkursoj, teatraj kaj filmaj vesperoj, blindula kongreso, infana renkonto.

La rezolucio akceptita fine de la laboroj, denove substrekis la absolutan neŭtralecon de U.E.A.

Ni memorigas ke la venontaj universalaj kongresoj okazos en Ateno, en 1976 (31a de Julio — 7a de Aŭgusto), en Reykjavik (Islando), en 1977, kaj eble en Bulgario en 1978.

LA GEJUNULOJ KONGRESIS EN FREDERICIA

Proksimume 250 gejunuloj el 30 landoj kongresis, la antaŭan semajnon, en Fredericia, ankaŭ en Danio.

En la kadro de tiu kongreso, okazis seminario de TEJO, ankaŭ por ne-esperantistoj, pri « Lingvo kaj dekoloniigo ».

Ni memorigas ke TEJO publikigas la bultenon « Novaĵoj de TEJO » en diversaj lingvaj eldonoj, por la bezonoj de informado. La interesatoj povas senpage ricevi tiujn bultenojn, se ili vere uzas ilin utile, skribante al : KER de TEJO, Riouwstraat 172, NL-Den Haag 2011, Nederlando.

LA S.A.T. - KONGRESO EN HAGO

La kongreso de S.A.T. okazis ĉi-jare en Hago en amikeca etoso kaj sub sennuba ĉielo. Ĝi kunigis 300 partoprenantojn el 19 landoj. En la kadro de la ampleksa programo prelegis C. Bruins, Errero, Levi, pri la jenaj temoj : Brazilo, la kaŭzoj de la ekonomia krizo, « virina danĝero ».

La venonta S.A.T. - kongreso okazos en la sveda urbo Gotenburgo de la 24a ĝis la 31a de Julio 1976.

MALLONGAJ INFORMOJ...

— 675 personoj el 20 landoj ĉeestis la kongreson de la esperantistaj fervojistoj, en Villach (Aŭstrujo). La kongreso de 1976 okazos en Svedio.

— Busto de Zamenhof estis inaŭgurita en Valenca (Brazilo) dum seminario en kiu 250 esperantistoj partoprenis.

— La socia-demokrata partio de Federala Germanio sendos observanton en la konferenco de la socialistaj esperantistoj antaŭvidita en Romo, en Septembro 1976.

— Pacifika Kongreso estas preparata en Melburno (Aŭtralio) por Januaro 1976.

— En D.D.R., la fakgrupo interlingvistiko-esperantologio daŭrigas siajn aktivecojn. En Leipzig okazis la tria scienca kolokvo por neesperantistaj sciencistoj.

— La Someraj Universitataj Kursoj en Lieĝo preparigas (somero 1976). En la antaŭviditaj fakoj : matematiko, biologio (zoologio), sociologio. Adreso : Someraj Universitataj Kursoj Boite postale 9, B - 4000 Liège 3, Belgio.

— Sovetanoj kreis novan sekcion de Internacia Ligo de Esperantaj Instruistoj. Adreso : J. Palu, Solme 21, 200016 Tallin, Ecesti NSV, USSR.

— La komitato de U.E.A. akceptis la aliĝpeton de Universala Medicina Esperanto-Asocio. U.M.E.A. nun havas 350 membrojn. Samtempe, la komitato aprobis kontraktojn pri kunlaboro kun Internacia Unuiĝo de la Esperantisto-Filologoj kaj kun Bahaa Esperanto-Ligo.

ESPERANTOLOGIO

Komence de 1976, la universitato Elte, en Budapeŝto, eldonos volumon sub la titolo « Esperantologiaj studoj ». Ĝi enhavos kontribuaĵojn de diversnaciaj lingvistoj. Oni povas antaŭmendi ĉe : Esperanto-fako de la katedro pri ĝenerala kaj aplikita lingvistiko, Universitato Elte-BTK, Budapeŝt V, Pesti B. 1-3, Hungario.

NOVAJ LIBROJ

— « Dona Barbara » klasika ĉefverko de la sudamerika literaturo, de la venezuela verkisto R. Gallegos.

— « Utaaro » de Takuboku, tradukita de Miyamoto. Japana poemaro.

— « Lingvoj, gentoj kaj lingva politiko », broŝuro de Prof. Duc-Goninaz (kurso de la somera universitato en Lieĝo).

« Anni kaj Montmartre », « La stranga butiko », « verdkata testamento ».

— « Etnografiaj donitaĵoj » de Nguyen Tu Chi (eldonita en Vietnamo).

« RENASKIĜO » EN ISLANDO


Pro la decido de U.E.A. kongresi en Reykjavik en 1977, la tiea movado kiu ne aktivis dum pluraj jaroj, refondiĝis sub la nomo : Islanda Esperanto-Asocio.

La Grandaj Damoj de la antikva Egiptujo

Egiptajn Reĝinojn, Princinojn, Altrangajn Damojn, Pastrinojn, konigis al ni la arkeologoj. Statuoj, freskoj, moneroj, bareliefoj alportis ĝis ni la trajtojn de iliaj vizaĝoj ĉarmaj aŭ severaj. La antikva Egiptujo konsentis al la virino, en socio aŭ en familio, konsiderindan rangon. Kelkfoje ŝia rolo estis hegemonia, vere matriarkeca. Samsangaj edziĝoj, similaj al tiu de Isis kaj Osiris okazis por certigi la purecon de la sango de la Reĝo, la superhoma estaĵo, la enkorpigita dio.

La egiptaj reĝoj estis poligamiaj ; politikaj aliancoj kondukis en ilian haremon multajn alilandajn princinojn. Sed, fratino aŭ ne de la Reĝo, la Granda Edzino estis apud sia edzo la dua persono de la ŝtato, kaj nur ŝiaj infanoj heredis la tronon. Tiu alta rango alportis al ŝi honorojn, prerogativojn sed ankaŭ, larĝmezure, realan politikan potencon. Kelkaj Reĝinoj restis diskretaj ; aliaj partigis kun la reĝo la regadon de la reĝejo. Eĉ kelkaj, kiuj famiĝis en la Historio, tenis en siaj manoj la tutan potencon. Ĉirkaŭ la fino de la Egipta Imperio, en la lasta miljaro antaŭ Kristo, la « Diaj Adorantinoj de Amon », edzinoj de la Reĝo de la Dioj, trudis sian propran potencon reĝan, materialan, kaj spiritan.

La prahistoria Alta-Egiptujo (el Amrah - 4000 - 3200) lasis elokventajn statuetojn : jen la dancistino.



La historia faraona periodo komenciĝas ĉirkaŭ la 3-a jarmilo. El la 3-a dinastio jen statuo de Damo Neset, edzino de Sepa, funkciulo ; ŝi havas striktan tunikon kun pinta dekoltaĵo, pezan perukon ; bronza ringo ĉirkaŭ la okuloj iom severigas la vizaĝon.

El la 4-a dinastio (-2780 -2280) epoko de Memfis, de la tri grandaj piramidoj (Keops, Kefren, Mikerius) oni retrovis, en funebra tombokelo, gereĝoj Mikerius en amika kuniĝo. Ankaŭ Damo Nefret akompanas sian edzon Rahotep, altranga eminentulo ; ŝi havas grandan blankan mantelon, enorman kolieron kaj diademon sur sia larĝa peruko ; koloraj strekoj pliakcentas ŝian rigardon.

La Meza Imperio daŭris tri jarcentojn kaj lasis statuojn de multaj reĝinoj kaj princinoj.

Jen la Nova Imperio kaj la fama 18-a dinastio

La reĝino Hatshepsout apartenis al tiu 18-a dinastio ; ŝi estis filino de Tutmosis la unu-a, kiu portis sian regadon ĝis la 4-a Katarakto kaj ĝis la riverego Eŭfrato. Hatshepsout edziĝis kun Tutmosis la dua, sia frato, kaj post lia morto kun sia nevo Tutmosis la III-a. La potenco de tiu reĝino estis grandega kaj ŝia reĝado brilega. Estis unu el la plej gloraj periodoj de Egiptujo : la invadantoj Hyksos estis forpuŝitaj ; Egiptujo okupis la Mediteranean Orienton. La ĉefurbo Tebo, « la urbo kun la cent pordoj » kantita de Homero, rekonis Amon-Re, kiel nacian dion (Amon-Re grupis diversajn diajojn ; Re estis la Suno) Hatshepsout konstruigis la funebran templon Deir-el-Bahari « la Belegaĵo el la Belegaĵoj » ; ankoraŭ hodiaŭ ĝi atestas la lukson kaj la artan perfektecon de tiu periodo. Por Karnak, ŝi hakigis du gigantajn obeliskojn 30-m. altajn, ĉiu el ununura granita bloko. Dum 20 jaroj Hatshepsout estis la « Suverenino de ĉiuj landoj, filino de reĝo, fratino de reĝo, edzino de reĝo kaj Edzino de la Reĝo de la Dioj ». Oni konsideris ŝin pli Reĝo ol Reĝ-edzino. Ofte ŝi estis reprezentita kun viraj vestoj, eĉ kun la artaĵa barbo, kiu markis la rolon de faraono. Je ŝia morto, ŝia edzo, Tutmosis la III-a, ĝis tiam nur Reĝin-edzo, detruigis ŝiajn statuojn kaj formarteligis ŝian nomon sur la monumentoj.


Tiy - Nefertiti

En -1408 Amenofis III iĝis reĝo. Dum 36 jaroj li estas tre granda reĝo. La imperio estas je sia apogeo. La militistaj ekspedicioj ne plu estas necesaj. La faraono okupiĝas je ĉaso kaj artoj. En lian rafinitan kortegon alvenas eminentuloj de ĉiuj landoj, artistoj, kaj multaj ričaĵoj. Amenofis III konstruigis grandiozajn monumentojn : la Templo de Louksor, la Kolosojn de Memnon. Li havas multvirinan haremon. Sed lia Granda Edzino Tiy estas mastra-virino ; ŝi havas eminentan rolon dum lia regado, kaj eĉ poste ; ŝi figuras en honora loko sur la monumentoj ; ankaŭ ŝiaj gepatroj ; la alilandaj suverenoj skribis al ŝi por peti de ŝi konsilon kaj eĉ helpon ; la grandaj projektoj ne timigas ŝin ; en kelkaj tagoj ŝi fosigis, fare de miloj da laboristoj, artaĵan lagon proksime de la reĝa palaco. Tiy ne akceptis rivalinon ; ŝi devigis la kromedzinojn flankenresti, eĉ tiun princinon de Mitanni (Sirio), kiu venis kun 300 Damoj de Honoro. Je la fino de la reĝado de Amenofis III (kiu estis trudizolita, aŭ detronigita, aŭ mense malsana) ŝi ekzerciis la regadon.

Amenofis III kaj Niy havis filon : Amenofis IV. Tiu ĉi iĝis reĝo en-1370. Li estis 13-jara kaj jam edzo de Nefertiti. Kune ili okazigis veran religian revolucion ; ĝis tiam Egiptujo havis multegon da dioj reprezentitaj sub formo homa aŭ besta. La ĉefa dio, Amon-Re jam grupis sub sia nomo diversajn diaĵojn. Amenofis IV rifuzas kulti Amon-Re kaj sin dediĉas al la kulto de unu unika dio Aton, « la Suno ». Li mem ŝanĝis sian nomon ; de nun li estas Akhenaton, « la servisto de la suna disko » Nefertiti fervore subtenas sian edzon. Ili forlasas Tebon, la ĉefurbon politikan kaj religian, kie regas Amon kaj la potenca kasto de la pastroj. Ili konstruigas, 300 km pli nor-

de, novan ĉefurbon : Akhel Aton « la horizonto de Aton », kiun oni nomas hodiaŭ Tell-el-Amarna. La kulto de Aton estis monoteisma ; ĝi enigis ideon de egaleco inter la civitanoj, kiuj egale profitas la bonfarojn de la suno ; ĝi sugestas novan arton, kiu forlasas la konvenciajn grandiozajn antaŭajn figurojn ; skulptistoj kaj pentristoj reprezentas familiajn scenojn en kiuj vivas feliĉa familio : Akhenaton, Nefertiti kaj iliaj ses filinoj ; ĉarmaj scenoj.

Nefertiti (ŝia nomo signifas : « la belulino venis ») estis bela kaj inteligenta ; ŝia ĉarma profilo, la gracileco de ŝia kolo, la pluriinia koliero, la peza ĉapo, la koloroj, kiuj akcentas la trajtojn de la vizaĝo, estas tre konataj. Face vidata la vizaĝo montras malplenan orbiton ; kial ? ĉu kriplaĵo ? ĉu trakomo ? oni ne scias. Aliaj torsoj de Nefertiti estas pli emociaj ol tiu ĉi. Akhenaton, kontraŭe, estis tute senĉarma : mallarĝaj ŝultroj, magraj membroj, prognata vizaĝo. Ŝajne, la pasio, kiu unuigis la geedzojn estintiĝis. Je la fino de sia regado la faraono montriĝis malpli fanatike malfavora al la antaŭa kulto de Amon. Kontraŭe Nefertiti restis fidela al Aton kaj ŝi forlasis sian edzon kaj retiriĝis en unu el siaj reĝaj rezidejoj kun la dua el siaj filinoj. Tiu junulino edziĝis kun malalt-ranga princo, kiu iĝis Toutânkhaton post la morto de Akhenaton. Nefertiti regentadas. Sed la juna princo estas forrabita de la Pastroj de Amon kaj kondukita al Tebo. Tie li prenas la nomon Toutânkhamon kaj redonas al Amon lian tutan potencon. La reago estis perforta ; la pastroj malaperigis la ĉefurbon de Nefertiti. Malfeliĉa Nefertiti ? oni neniam retrovis ŝian tombon. Toutânkhamon regis 9 jarojn ; li estis 19-jara kiam li mortis. Li ricevis la riĉan tombon, pri kiu oni multe parolis. Li estas unu el la lastaj reĝoj de tiu 18-a dinastio. La juna vidvino, ĉar filino de Nefertiti, estis forlasita de ĉiuj ; ŝi provis trovi edzon, ĉe la Hititaj princoj sed la fianĉo mortis survoje antaŭ ol alveni ĝis ŝi. Fine ŝi estis devigata edziĝi al maljunulo, al sia propra avo, la patro de Nefertiti.



En la 19-a dinastio, Ramses la 2-a tre longe regis (-1301-1235). Li estas grandega figuro de la Egipta Historio. Kun li ĉio estis granda. (Li estis filo de Sethi la unua, kiu haltigis la invadon de la Hititoj kaj kiu triumfis en Palestinio). La monumentoj de tiu periodo denove estas grandiozaj ; surroka templo de Abou-Simbell, Obelisko de Louksor ; en Tebo la Ramesseum, funebra templo. Antaŭ tiu templo unu statuo alta je 18 metroj, hakita el unuura granita bloko. Lia patrino Toui, edzino de Sethi, havis statuon 3m-altan ; ŝia hararanĝo estas monumenta : la peruko estas envolvita en postrestaĵo de vulturo kaj superstarita de alta ĉapo ornamita je kapoj de uraeus (kobro kun ŝvelanta gojo). Toui estis edzino kaj patrino de grandaj reĝoj. Ramses II mortis en sia 83-a jaro. Li havis multajn edzinojn, precipe alilandajn princinojn, kiuj donis al li 160 infanojn. Unu el liaj unuaj edzinoj, Nefertari, estas reprezentita, en unu tombo de la Valo de la Reĝinoj, ludanta zenet-ludon.

Kleopatra (-69 -30)

Post la morto de la Granda Aleksandro (-323) liaj generaloj partigis inter si lian vastegan imperion. Ptolemeo proprigis al si Egiptujon. 15 Ptolemeoj sinsekve regis super Egiptujo. Estas la 13-a, (-51 -47), kiu edziĝis kun sia fratino Kleopatra (la sepa), kiu famiĝis en la Historio. Ptolemeo-13 baldaŭ elpuŝas ŝin el la trono. Kleopatra rifuĝas en Romo ; ŝi estas 22-jara, kiam ŝi iĝas amorantino de Cezaro ; li estas jam maljuna kalva, senĉarma. Li reinstalas Kleopatra sur la tronon de Egiptujo ; li donas al ŝi filon ; estas Cezarion, kiu iĝos Ptolemeo la 15-a. Post la morto de Cezaro, Oktavio-Aŭgusto lin murdigos. Kleopatra provas restarigi la estrecon de Egiptujo super la landoj de la Orienta Mediteraneo. En -41 ŝi renkontas Antonio, leŭtenanto de Cezaro kaj poste triumviro de Oktavio-Aŭgusto (kun kies fratino li edziĝis). Li enamiĝas al Kleopatra kaj donas al ŝi Kreton, Fenicion, Cipron, kiujn li konkeris kun la romiaj soldatoj. Sed venkita sur maro, sieĝata en Aleksandrio, li mortigas sin. Kleopatra petas indulgon de Oktavio-Aŭgusto ; antaŭ lia rifuzo, ŝi mordigas sin per aspido.

La dinastio de la Ptolemeoj estingiĝas kun ŝi. La tiamaj verkistoj skribis pri ŝi sevorajn juĝojn : Properce nomis ŝin « trita » = multe uzata ; Plino la Maljuna nomis ŝin « la publikulina Reĝino ». Cicerono, kiu tamen ofte vizitis ŝin en Romo, diris : « Mi malamas la Reĝinon », eble ĉar ŝi ne konsentis al li siajn favorojn. La sekvantaj historiistoj de la 2-a kaj 3-a jarcentoj opiniis ŝin « la plej bela el la virinoj ». Tamen Plutarque pensis ke ŝia beleco estis eksterordinara, sed ke ŝia logo venis el ŝia sprito kaj konversacio. La moneroj, kiuj reprezentas ŝin montras obstineman vizaĝon, fortan makselon kaj nazon arkitan kaj elstaran. Shakespeare montris ŝin mortiganta sin por atingi senmortecon.

el la libro de H.-P. EYDOUX.

DU FAMAJ AVIADISTOJ, FERVORAJ ESPERANTISTOJ

La Francaj ĵurnaloj, gazetoj, radio, televido ĵus solenis la memoron de Henri Farman, pioniro de aviado. Prave, oni emfazis liajn heroaĵojn, kaj lian sindonon al afero, tiutempe taksita de iuj kiel frenezaĵo, de aliaj kiel malebla utopio. Pro stranga preterlaso, la laŭdoj kaj biografioj tute silentis pri unu agadon de la heroo, kiu estis tre grava afero por li, pro sia rilateco kun aviado. Ĝi estas la internacia lingvo Esperanto.

Por tion scii, sufiĉas legi la antaŭparolon de li verkitan por verko de la granda pioniro kaj meceno de aviado, Ernest Archdeacon. Tiu libro estis eldonita de la librejo A. Fayard en 1910, kaj titolas : « Kial mi fariĝis Esperantisto ». Jen kelkaj linioj el la antaŭparolo de Henri Farman :

« Tial, komence de la jaro 1907a, mi revizitis mian amikon Ernest Archdeacon, kaj sciigis lin pri mia decido definitive dediĉi min al aviado. Mi ne bezonas diri, kiel entuziasme li akceptis tiun ideon. Li respondis al mi tion, kion mi memoras preskaŭ laŭvorte :

« Via ideo estas belega, kaj vi devas « elfari ĝin ». Vi scias, ke mi helpis la debuton de tre inteligenta viro, Gabriel Voisin, kiu estis mia kunlaboranto por miaj eksperimentoj en Berck. Mi tre konsilas, ke vi mendu aeroplanon al li ; bonega praktikisto de mekaniko kiel vi, admirinde kompletigos la kvalitojn de Gabriel Voisin, kaj kunlaborante, vi nepre konstruos rimarkindan aparaton.

« Aliflanke, la eksterordinara ciklisto, la viro trejnita je ĉiuj korpaj ekzercoj, kiu de ĉiam vi estas, povas nur fariĝi rimarkinda piloto. Iru antaŭen, estu obstina kaj pacienca, vi certe sukcesos.

« Vi konas la ekziston de la 50 000-franka premio fondita de S-ro Deutsch kaj mi por la unua kilometro flugita laŭ fermita cirkvito per aeroplano ?... Se vi volos, kaj estos necedema, vi estas kapabla gajni ĝin... ».

— Malpli ol unu jaron post tiu vizito, la 13an de Januaro 1908, mi gajnis la 50 000-frankan premion Deutsch-Archdeacon...

Sed nun hodiaŭ, Ernest Achdeacon, ne plene kontenta ke li lanĉis aviadon, nepre volas doni al ĝi « universalan ŝlosilon », kio estas evidente Esperanto... Post ne pli ol unu kvarono de horo li montris al mi ĝian tutan mekanismon ; ne necesas esti gramatika agregaciulo, eĉ ne bakalaŭro por kompreni ĝin. Ĉiu konsentu oferi tri horojn por la studo de la lingvo, kaj ĉiuj baldaŭ povos sin komprenigi ; malgranda peno estos rapide centoble rekompencita... Mi fluege legas ĝin, kaj skribas tre facile ; eĉ mi havis okazon uzi ĝin por komerca korespondo... La interesa libro, por kiu mi skribas tiun antaŭparolon estas, fare de mia amiko Ernest Archdeacon, plia plene konvinka ago ».

« Cetere, mi ripetas, ke la kreo de Esperanto plenumas por la aviadistoj, veran bezonon ».

En artikoloj aŭ biografioj pri Henri Farman kaj Ernest Archdeacon, mi ne trovis eĉ aludon pri ilia poresperanta agado. Ĉu ekzistas ia « konspiro de silento » kontraŭ la internacia lingvo ? Aŭ ĉu la verkistoj kaj ĵurnalistoj opiniis tiun agadon, kiel nur malgravan flankokupon, « hobion » ne pli menciindan ol kolektado de poŝtmarkoj aŭ butonoj ?

Eloi MOTILLON.

PRELEGOJ DE GRESILLON

"HOMO KAJ MAŜINO"

Bonvolu korekti...

En la lasta numero de Kulturaj Kajeroj N° 1975 3-4, La artikolo de S-ro De Waard « La ventmuelejoj en Nederlando » entenas gravajn erarojn : la numerado de la figuroj estas tute fuŝita. Bonvolu legi, anstataŭ figuro 2, *FIGURO 4*, anstataŭ figuro 3, *FIGURO 2*, anstataŭ figuro 4, *FIGURO 5*, anstataŭ figuro 5, *FIGURO 6*, anstataŭ figuro 6, *FIGURO 3*. Nur *FIGURO 1* havas la ĝustan numeron. La aŭtoro kaj la legantoj bonvolu senkulpigi la stultan neatentemon de la redakcia sekretario.

VENTMUELILOJ KAJ VENTMUELEJOJ EN LA MONDO

Kio estas muelilo ?

Origine, ĝi estas « ilo por mueli ». Fakte, oni tiam nomis « muelilo » nur maŝinojn por mueli grenon aŭ aliajn grajnojn, por dispremi ilin kaj fari farunon per du muelŝtonoj : unu senmova (la « kuŝanta muelŝtono »), super kiu turniĝas alia (la « kuranta muelŝtono »).

Poste, oni nomis « muelilo » ankaŭ maŝinojn, kiuj ne muelis sed faris alian laboron : pumpi akvon, dragi ŝlimon aŭ sablon el la fundo de haveno, fari paperon, k.t.p.

Fine, oni emis nomi « muelilo » ĉion, kio pli-malpli rapide turniĝas, sed ne muelas kaj eĉ ne estas verai iloj ; ekzemple, posedanto de aŭtomobilo diras « mia muelilo » parolante pri la motoro de sia veturilo ; oni eĉ diras pri tre babilema homo : li (aŭ ŝi) estas « vera parolmuelilo ».

Paroli pri la muelilo havas sian lokon en la kadro de la prelegserio « HOMO KAJ MAŜINO », ĉar muelilo estas **maŝino** : ĝi ne estas tiel simpla ilo, kiel la pistilo, kiun uzas kelkaj afrikaj triboj por pisti la milion, sed vera maŝino diversmaniere movata. Aliflanke, muelilo **helpas la homon,** kaj oni pli kaj pli perfektigis tian maŝinon, por ke alia forto ol la brakforto de la homoj faru la laboron : post uzado de sklavoj, oni uzis bestojn, akvon, venton, fine elektron.

Parolante pri la freŝdata apero en sia lando de la akvomuelilo, la greka poeto Antipatros de Tesaloniko skribis la jenan poemon :

« Vi, virinoj, kiuj servutas por mueli la grenon, ne plu lacigu viajn brakojn ; vi povas kviete dormi, kaj lasi kanti la birdojn, kiuj anoncas la revenon de l'aŭroro. La

diino Ceresa ordonas al la Najadoj fari tion, kion faris viaj manoj. Ili obeas, ili eljetiĝas ĝis la supro de rado, kiu turnas la radakson ; la akso, pere de la radioj kiuj ĉirkaŭas ĝin, fortege turnas la muelŝtonojn. Jen ni revenas al la feliĉa kaj kvieta vivo de niaj prauloj : ni eklernas prepari la nutraĵojn kaj senpene ĝui la fruktojn de la Demeterlaboroj ».

La mueliloj, precipe la akvomueliloj kaj la ventmueliloj estas tute dezirindaj maŝinoj, ĉar ili **ne venenigas nian atmosferon,** en nia nuna tempo, kiam oni devas lukti kontraŭ la daŭra malpurigado de la ĉirkaŭa naturo fare de la industriaj maŝinoj.

La mueliloj estas maŝinoj, kies funkciado bezonas nek karbon, nek petrolon, ĉar ili **uzas nur la naturajn energiojn** ĉie troveblajn ĉirkaŭ ni : akvo, vento aŭ tajdo, do senkostan energion.

Perventaj maŝinoj

Ni nun pli speciale parolu pri la **ventmueliloj** kaj la konstruaĵoj en kiuj ili funkcias, t.e. la **ventmuelejoj.**

Aŭdante tiujn du vortojn, ĉiu el ni emas pensi pri la tipoj, kiujn li aŭ ŝi vidis en sia propra lando aŭ dum siaj vojaĝoj eksterlande : Ekzemple oni pensas pri turo provizita per grandaj aloj. Sed multe pli diversaj estis kaj ankoraŭ estas tiaj maŝinoj kaj tiaj konstruaĵoj en la mondo.

Kie kaj kiam aperis la unuaj ventmueliloj kaj ventmuelejoj ?

Pri la origino kaj la naskiĝdato de la unuaj ventmueliloj oni ankoraŭ scias nenion certan malgraŭ la strecaj kaj persistaj serĉadoj de multaj fakuloj : historiisto, sociologoj, folkloristoj kaj aliaj sciencistoj. Nur du asertojn oni verŝajne rajtas fari : la homoj inventis la akvomuelilojn multe da tempo antaŭ ol la ventmuelilojn ; — la unuajn ventmuelilojn oni konstruis en Oriento aŭ Mezoriento.

Laŭ la lastaj dokumentoj, kiujn mi povis konsulti, la unua konata akvomuelilo datiĝas de la jaro 120-a antaŭ Kristo, kaj la unua konata ventmuelilo ekzistis en Islamo iom antaŭ la jaro 644-a post Kristo. Do proksimume 800 jaroj pasis inter la du inventoj. Kaj en Eŭropo, nur dum la 12-a jarcento, aŭ eble je la fino de la 11-a, aperis la unuaj ventmueliloj. La plej malnovaj dokumentoj en kiuj temas pri ventmuelilo devenas de Francujo (Pikardio kaj Normandio) kaj de Britujo. Poste, rapide disvastiĝis la konstruado de tiaj perventaj maŝinoj, norden ĝis Skandinavio, suden ĝis la okcidenta, centra kaj suda partoj de Francujo, orienten ĝis Germanujo kaj centra Eŭropo. Sed oni scias nenion precizan pri la deveno de la Portugalaj kaj Grekaj ventmueliloj, kies ekstera aspekto tre diferenciĝas disde tiu de la aliaj.

Pri la invento de la unua ventmuelilo, la historio — aŭ la legendo — rakontas la jenan anekdoton : « La kalifo Omar la 1-a, kiu regis Islamon inter la jaroj 634-a kaj 644-a, iun tagon venigis al si Persan militkaptiton kaj diris al li :


— Vi fanfaronas, oni diris al mi, ke vi kapablos konstrui muelilon funkciigatan de la vento. — Je Dio, respondis la militkaptisto, mi konstruos tian muelilon, pri kiu parolos la tuta mondo ».

Do ŝajne en Islamo ekestis la unua ventmuelilo.

Ĉu la ventmueliloj devenas de la akvomueliloj ?

Por povi pli bone respondi al tiu demando, oni devas scii, kiaj estis antaŭe la akvomueliloj, kiam aperis la ventmueliloj.

La unuaj akvomueliloj, laŭ miaj scioj, uzis horizontalan padelradon kun vertikala akso, kiu estis ankaŭ la akso



de la horizontala muelŝtono (**fig. 1**). Do tiu turniĝanta muelŝtono moviĝis laŭ la sama rapideco, kiel la padelrado, kaj la laborkvanto de la maŝino estis malgranda, ne sufiĉa. Sed dum la 1-a jarcento, la romia arkitekto **Vitruvius inventis la dentradaron** kun transmisio al la turniĝanta muelŝtono per du dentradoj (**fig. 2**). Tiu sistemo ebligis pli facilan instalon de la padelrado en rivereto aŭ kanalo, kaj pli rapidan movon de la muelŝtono, laŭ la proporcio inter la nombroj de la dentoj ĉe la du dentradoj. Do povas esti, ke la unuaj ventmueliloj en Islamo devenis de la unua sistemo, ĉar ankaŭ ili uzis vertikalan akson por siaj aloj, kiel ni baldaŭ vidos.


Ĉu la ventmueliloj devenas de la preĝmueliloj ?

Kelkaj serĉistoj, sciante ke multajn jarojn antaŭ la ventmueliloj, kaj eĉ antaŭ la invento de la akvomueliloj, jam ekzistis en Ekstremoriento **preĝmueliloj,** kiuj estis **perventaj turniloj,** opiniis, ke eble oni povas trovi tie la devenon de la ventmueliloj. Tio estas ja ebla hipotezo, sed nur hipotezo, ĝis nun ne pruvita.

Ĉu la Eŭropaj ventmueliloj devenas de la Orientaj mueliloj ?

Oni longtempe kredis kaj asertis, ke la Krucmilitistoj, vidinte la Orientajn ventmuelejojn, alportis en Eŭropon, precipe en Francujon, la modelojn de la Orientaj maŝinoj. Sed oni nun pli kaj pli dubas pri tiu klarigo, pro diversaj kialoj : unue, la historiistoj sciigis al ni, ke dum la sieĝo de la urbo Sankta Johano de Akro (St Jean-d'Acre) la krucmilitistoj mem konstruis antaŭ la urbo ventmuelejojn « **kiu mirigis kaj teruris la Arabojn** ». Tio montras, ke la Eŭropanoj jam povis konstrui tian muelejon, kaj ke tiu ĉi konstruaĵo tute malsimilis al la arabaj mueliloj.

Fakte, la Orientaj ventmueliloj kaj ventmuelejoj havas mekanismon kaj formojn tute aliajn ol la Eŭropaj. En Irano, Afganistano, Ĉinio, la ventmuelejoj estas neorienteblaj konstruaĵoj, kun vertikala akso kaj ses vertikalaj aloj el tolo, pajlo aŭ bambuo, kiujn turnas la vento. En Seistano — do en Centra Azio, inter Irano kaj Afganistano — estis konstruaĵoj kun kvar aperturoj tiel bone aranĝitaj, ke la aloj turniĝis en la sama senso, kiu ajn estas la direkto de la vento (**Vidu fig. 3**). Tiajn sistemojn oni ne trovas en Eŭropo.



Skemo de neorientebla muelilo en Seistano (centra Azio) - fig. 3

En tiu Seitana sistemo, kiu ajn estas la direkto de la vento, la vertikalaj aloj ĉiam turniĝas laŭ la sama direkto. Tion montras la horizontala sekco

La granda diverseco de la ventmueliloj kaj ventmuelejoj


Krom la Orientaj konstruaĵoj, pri kiuj ni ĵus parolis, oni trovas tre diversajn formojn ankaŭ en Eŭropo.

La muelejo, t.e. la konstruaĵo kiu entenas la mekanismon, povas esti el ligno, el ŝtono, el brikoj, aŭ parte el ŝtono kaj el ligno, kelkfoje parte, el metalo.

En la plej malnovaj **lignaj ventmuelejoj,** la tuta korpo de la muelejo (kiu estas konstruita sur videbla aŭ nevidebla bazo) estas orientebla al la vento per lofilo, kiu ofte estas longa trabo transpasanta la eksteran ŝtuparon de la muelejo. Poste, oni konstruis muelejojn kies nur superan parton oni povis orienti laŭ la vento. Fine — kaj tiel estas preskaŭ ĉiuj **ŝtonaj kaj brikaj muelejoj** — nur la tegmento estas orientebla, jen per ekstera mekanismo (trabo aŭ trabaro), jen per interna mekanismo kelkfoje tre komplika (ekzemple en la provinco Nordholando de Nederlando).

Kelkaj tipoj de francaj ventmuelejoj


fig. 4



La konstruaĵo, do la muelejo mem, havas tre diversajn formojn, kaj nur longa serio da bildoj povus sufiĉe bone montri tiun grandan diversecon. Ĝi povas esti nur kvadrata (precipe ĉe la lignaj muelejoj) aŭ sesflanka, okflanka piramidtrunko, aŭ cilindra, konustronka el ŝtono, malalta kaj larĝa (ekz. en Bretonio) aŭ kontraŭe tre alta kun balkono (Nederlando, Germanujo). Oni ankaŭ renkontas strangajn formojn, maloftajn eĉ unikajn : ekz. en Portugalujo staras prisma triangula muelejo el ligno, kies tuta korpo estas orientebla per cirkla movo ĉirkaŭ fosto, kiu staras en unu el la tri anguloj de tiu vertikala prismo ; — en Svedujo estas neorientebla segejo, kiu aspektas kvazaŭ granda ligna tenejo konsistanta el triangula fasado kun 6 lignaj aloj, sub longa ligna tegmento, kies du deklivoj malsupreniras ĝis la grundo.

Kelkaj tipoj de diverslandaj ventmuelejoj

fig. 5



Ankaŭ **la aloj de la mueliloj** estas tre diversaj. Ni jam vidis, ke en Orientaj konstruaĵoj oni trovas alojn, kiuj estas vertikalaj **paneloj el pajlo** (Afganistano, Irano) **aŭ bambuo** (Ĉinio). Sed kiaj estas la aloj en Eŭropo, en Ameriko ?

Ĉe malnovaj mueliloj, ili ofte estis el ligno : **lignaj paneloj,** parte fiksaj, parte almeteblaj, se necesis, laŭ la vento (Portugalujo, Skandinavio).

En multaj landoj, ili longtempe estis **longaj lignaj brakoj** kun **kombilforma aŭ kradforma latalo** por ricevi **tolajn bendojn** (multaj Eŭropaj landoj kaj en Ameriko) aŭ **tolajn velojn triangulajn,** kvazaŭ ŝipajn ĵibojn (Portugalujo, Grekujo).

(Daŭrigota)

L. Chasserlaud.


EVOLUCIO KAJ SEKSECO DE LA PLANTOJ

Kiam oni parolas pri Evolucio oni preskaŭ ĉiam pensas pri la Bestoj kaj pri la Homo. Sed la Plantoj ankaŭ evoluis laŭlonge de la jarmiloj por fine fariĝi la plej perfekta orkideo. Kiel la bestoj, la plantoj eliris el la maro, invadis la dolĉajn akvojn antaŭ ol sin ekĵeti al la konkero de la elmergiĝintaj teroj. Kiel ĉe la bestoj, kelkaj vegetalaj specioj prosperis, koloniis la teran globon, malaperis kaj estas nun reprezentataj de raraj specioj : relikvoj aŭ fosilioj.

Pro la neesto de perantaj formoj, la scienculoj de la antaŭa jarcento atribuis la multecon de la formoj al Dia Kreado, tuj multforma, senŝanĝebla kaj senmova. Sed la evoluismaj teorioj de Darwin renversis tiun « fiksismon ». La ideo pri Evolucio atingis ĉiujn sciencojn ; jam la arkeologoj iom post iom resupreniras la jarcentojn serĉe al la antaŭuloj de la Egiptoj, de la Fenicoj, de la Sumeranoj ; serĉe al la lingvaĵoj kaj ideografiaĵoj, kiuj antaŭis la hebrean, grekan kaj latinan lingvojn. Same la paleontologoj, esplorante ĉiun etapon de la Evolucio, studante la mutaciojn, klopodas resupreniri ĝis la origino de la specioj.

Sed la malfacilaĵo estas granda kaj la perantoj mankas. T. de Chardin diras : « La pasintaj realaĵoj lasis nur postrestaĵojn, kiuj respondas al iliaj kvantaj maksimumoj (t.e. la periodo de sukceso kaj stabileco) ; la periodoj de naskiĝo kaj establado respondas al la minimumoj de daŭro kaj amplekso kaj malaperas ne lasante spuroin ». Tiel la unuaj aviadiloj, la unuaj aŭtomobiloj malaperis (escepte de kelkaj specimenoj en la muzeoj). Se niaj metalaj aparatoj fosiliiĝus, la estontaj paleontologoj ne estus retrovontaj la rudimentajn tipojn, kiuj antaŭis niajn multegajn, perfektigitajn kaj normigitajn aparatojn. La vivo antaŭeniras kiel traino de ondoj ; ĝi progresas laŭ ventroj kaj nodoj ; la nodoj estas periodoj de krizo, transiro, kreado ; la ventroj estas pli longaj faroj de disfloriĝo, ekvilibro kaj stabileco. Reale ĉiu neevitebla puŝo de la evolucio estas nur skizoj, sinsekvaj provoj kun enorma malŝparado de energio kaj sennombreblaj malsukcesoj. « La origino kaŝiĝas sub la komenciĝoj » diras Heidegger ; kaj la komenciĝoj mem estas neperceptebla malgraŭ la nekontestebla realo de la etapoj, kiuin ili anoncas. Kiu povus antaŭdiri, hodiaŭ, kio estos morgaŭ ? Kaj tamen ni estas en plena mutacio ; la estonteco konstruiĝas sub niaj okuloj, ĉirkaŭ ni. La familiaraj bildoj de la pasinteco troplenigas nian memoron. Morgaŭ estas mistero.

Antaŭ la multeco kaj diverseco de la vegetalaj formoj jam la primitiva homo sentis la bezonon doni nomon al ĉiu el tiuj plantoj kaj poste ilin arigi en precizain grupojn : oni konsideris la formon de la folioj, la nombron de la petaloj, de la stamenoj. Sed en la lasta jarcento la malkovro de la sekseco kaj de la evolucio de la vegetala regno renversis la tradiciajn nociojn. La scienculoj komencis interesiĝi pri la pliboniĝo de la seksa aparato de unu specio al la alia ; ĉe la vegetaloj, kiel ĉe la bestoj, eĉ de la tempoj la plej antikvaj, la fundamenta skemo de la reproduktado strange restas identa al si mem ; la seksa reproduktado — eĉ nivele de la plej rudimentaj formoj, ĉe la unuĉelaj estaĵoj — estas karakterizata per la kununuiĝo de du specialaj ĉeloj : la gametoj maskla kaj femala ; la rezulto de tiu kununuiĝo estas la ovo, fundamenta ĉelo el kiu formiĝos, per sinsekvaj partiĝoj, nova vivanta estaĵo.




La kununuiĝo de la gametoj estas adicio de kromosomoj : N kromosomoj masklaj + N-kromosomoj femalaj = ovo kun 2N kromosomoj. La individuo, kiu rezultas de tiu adicio devus enteni 2N kromosomojn. Tio ne estas ; la Naturo intervenis ; jen kio okazis : la ovo entenas Patrinajn ĉelojn ; ĉiu el ili partiĝas en kvar Filinajn ĉelojn nomitaj Sporoj ; tiuj ĉi sporoj havas nur N kromosomojn ; ĉi tie ĵus okazis la Kromosoma Redukto ; ĝermante la sporoj siavice partiĝas kaj donas ĉelojn, histojn, entenate la gametojn kun N kromosomoj (la talo de la Algoj entenas N kromosomojn). La periodo kun N kromosomoj estas la « Haplofazo » ; la periodo kun 2N kromosomoj estas la « Diplofazo » ; ĉe la estaĵoj la plej evoluintaj la diplofazo (2N) estas multe pli longa ol la haplofazo (N). La tuta homo konsistas el ĉeloj kun 2N kromosomoj ; estas en la testikoj kaj en la ovarioj, ke okazas la kromosoma redukto ; nur la reproduktaj ĉeloj entenas N kromosomojn. La diplofazo reprezentas la tutan vivon de la homa estaĵo ; ĉe bestoj kaj vegetaloj la daŭro de la

diplofazo estas pli kaj pli longa laŭmezure ke ili evolucias laŭlonge de la jarmiloj.

LA MUSKOJ - PRAHISTORIO DE LA TERAJ PLANTOJ

Pro ilia malalta staturo ili okupas diskretan lokon en la vegetalaro ; ilia rudimenta strukturo kaj ankoraŭ plie ilia reprodukta sistemo sugestas tre antikvan originon. Oni retrovis muskojn en la Karbonio de la Primara Erao (t.e. antaŭ 250 milionoj da jaroj) kaj eĉ antaŭe. Oni ĝenerale ilin konsideras kiel unu el la unuaj grupoj de la verdaj plantoj, kiuj, devenintaj el la Algoj, koloniis la elmergiĝintajn terojn ; Ili reprezentas unuan provon por adaptiĝi al la vivo ekster la akvo, kun kreado de aeraj organoj. De post tiu granda atingo ili restis dum miloj da jaroj en tiu rudimenta vivmaniero kaj ne kapablaj evolui, kaj pliboniĝi. Ili restis la provaĵo de tiuj tre malproksimaj tempoj, kiam la plantoj ankoraŭ ne inventis lignon, nek ovolon, nek frukton, nek grajnon.

Dank'al sia akva vivo, la Algoj bezonas nek subtenan aparaton, nek cirkuladaparaton ; ili havas nek foliojn, nek tigojn, nek radikojn, sed nur talon. Same, ĉar ne sciinte efektivigi la sintezon de la lignino, la kemia altvalora konstituanto de la ligno, la muskoj posedas nek subtenan aparaton, nek cirkulad-aparaton ; ili ne superas 2 cm. (escepte ĉe la tropikoj, kie ili atingas unu metron). Manke de veraj radikoj, de veraj angioj, la vivanta suko povas cirkuli de unu ĉelo al la alia nur osmoze. Tamen tio estas jam evidenta progreso : tiu 2-centimetra tigo, nomita « Kormuso », portas folietojn dislokitajn laŭ la tri dimensioj, kio permesas, grandproporcie, pligrandigi la « utilan surfacaĵon », sur kiu efektiviĝas la klorofila funkcio. Kiel ĉe la koraloj de la Sudaj Maroj, la Naturo kompensas tiun malgrandan alton per enormaj grupoj da muskoj ; ĉar « Unuiĝo faras Forton », la granda nombro da malgrandaj estaĵoj ekvilibras, kiel eble, plej bone, la potencon de la plej fortaj.



La evolucio ne iras sen Rezisto al Progreso, (rezisto bone konata de la homaj societoj : regreso de la inteligenteco ĉe la maljunulo, dekadenco de la civilizacioj). Kelkaj musko-specioj ne povis konservi sian vertikalan pozicion : ilia foliigita tigo kuŝas sur la grundo ; aliaj revenis al algo-stato kaj estas nur talo ; la musko ne sciis tute liberiĝi de sia peza heredeco : en ĝi la algo ĉiam dormetas.

APERO KAJ DISVOLVIĜO DE LA LIGNAJ ĈELOJ

Al kiu genia specio oni devas atribui la inventon de la ligno ? Kie kaj kiam tiu granda akiro okazis ? Jen demandoj, al kiuj oni ne povas respondi, ĉar la origino de tiu grava evento perdiĝas en la nokto de la tempoj.

En 1935 oni malkovris en Aŭstralio fosilion « la Baragwanathia » en Siluria tavolo. En 1953 oni trovis lignon ĉe diversaj fosiliaj plantoj, en Kambriaj tavoloj de Siberio. En Siluriaj kaj Devoniaj tavoloj (kio reprezentas 300 milionojn da jaroj antaŭ ni) oni trovis « Nematofitojn », kiuj estas grandstaturaj angiaj plantoj. Kaj subite, en ruĝaj grejsoj de Skotlando oni trovis grandan kvanton da ligno ĉe Psilofitonoj (senfoliaj plantoj). Ili similis junkojn kaj estas la angiaj plantoj la plej simplaj, kiujn oni konas. Ili instaliĝis en marĉoj. Ili estas la perantoj inter Algoj kaj Filikoj kaj Selagineloj. Ili estas la origino de la moderna vegetala mondo.

LA MUSKOJ - ILIA SEKSECO

Printempe elmergiĝas el la musko-tapiŝo maldikaj filamentoj nomitaj Kormusoj. Ili portas la seksajn organojn ; la seksoj estas apartigitaj (kio estas rara ĉe la vegetaloj) ; la masklaj kormusoj estas pli longaj ol la femalaj kaj enhavas la masklajn gametojn ; tiuj ĉi portas vibrajn ciliojn, kiuj permesas ilian translokiĝon en la akvo (ekz : pluvakvo), nepre necesa al tiu translokiĝo. Estas la maskla sekso, kiu iniciatas la operaciojn ; li estas la aktiva sekso, dum la femala sekso kontentiĝas je pasiva rolo. Tiu vojaĝo de la spermatozoj kondukas ilin al la femalaj gametoj. La femala gameto estas ronda ĉelo senmova, lokita funde de kapsulo. La spermatozo eniras en la kapsulon ; fekundiĝo okazas kaj formas ovon (la ciklo estas : ovo — patrinaj ĉeloj — sporoj). Kiam la sporoj estas maturaj la ĉapelo de la kapsulo falas. La buŝo de la kapsulo estas ĉirkaŭita de lignaj dentoj (nur tiuj dentoj en la tuta planto havas ligninon) ; laŭ la humideco de la aero, tiuj dentoj streĉiĝas aŭ malstreĉiĝas por renversi la kapsulon kaj faligi la sporojn teren. La sporo ĝermas kaj donas maldikan filamenton similan al talo. Sur tiu ĉi filamento kreskas kaj sekse diferenciĝas la novaj kormusoj, kies ensemblo formos la musko-tapiŝon.

Ĉe la muskoj la Haplofazo (N) estas longdaŭra (sporo — filamento — kormuso — gametoj) kaj la diplofazo (2N) estas mallonga (ovo kaj patrinaj ĉeloj).

El la libro de J.M. Pelt
(Evolucio kaj Sekseco de la Plantoj).


La Unukornulo - Fabela besto

La unuaj bildoj de la unukornulo aperas jam en la 4-a jarmilo. Tiam la besto havis flugilojn, kiujn la Mezepoko forprenis. Sumera sigelo montras du vid-al-vidajn unukornulojn, ambaŭflanke de Vivo-Arbo. Apud siaj diverskoloraj dragonoj la Ĉinoj havis unukornulon, kies apero anoncis periodon de feliĉo kaj prospero. Ŝajne la unua, kiu priparolis tiun fabelan beston, estas Ctesias, greka historiisto (500 ant. K.) en siaj Verkoj pri Persujo kaj Hindujo. En la 9-a jarcento (post K.) la ĉina verkisto Han Yu skribis : « Universale oni akceptas, ke la unukornulo estas supernatura besto kaj bonaŭgura ; sed ĝi ne montriĝas inter la dombestoj ; estas malfacile ĝin rekoni ; ni ne scias, kia ĝi estas ». Ofte oni reprezentas ĝin kiel barban ĉevalon portantan sur la frunto longan kornon de narvalo. En blazonistiko ĝi havas kapon de kaprino kun flirtema barbeto, fenditajn piedojn, kolhararon kaj taŭran voston. La antikvaj verkistoj lokis ĝin en Etiopo (Cosmas), en Hindujo (Abou Seid, araba vojaĝanto) en Basman-reĝejo (Marko Polo), kaj en Ĉinio. La mongolaj historiistoj rakontas, ke Ĝingis-Ĥano, survoje al Hindustano, renkontis, sur la Tibetaj montoj, unukornulon ; tiu apero estis por li malpermeso eniri en la sanktan landon ; li returne iris. Pline kaj Cuvier metis ĝin en la rinoceredon ; aliaj opiniis ĝin gazelo, bubalo, primitiva bovo, alko, « oryx », aŭ sovaĝa azeno. Pri sia karno la opinioj diferenciĝis : Ctesias certigas ke ĝi estas ekstreme amara, dum Abou Seid trovas ĝin tre bongusta ; ĝia ĉefa malamiko estas la elefanto ; ĝi luktas kontraŭ la dragono ; ĝi ŝatas la birdojn, kaj la kolomboj instaliĝas sur ĝia korno. En sia « Parolado pri la Unukornulo » Ambroise Pare arigis ĉion, kion oni sciis pri tiu fabela besto. Reale, oni sciis tion nur onidire. Jam de la 16-a jarcento (post K) Jerome Cardan esprimas kompletan skeptikismon kaj cent jarojn pli poste A. Kircher certigas, ke ĉiuj tiuj kornoj, kiujn la reĝoj montras en siaj kurioza-ĵejoj estas nur kornoj de narvalo, « tornitaj kiel ŝraŭboj ».

La superstiĉoj pri la unukornulo estas multaj. Oni konsideris ĝin kiel antidoton kontraŭ pesto kaj venenoj. En Hindujo, laŭ Ctesias, oni fabrikis el ĝi glasojn, kiuj tuj rompiĝis, kiam enen oni verŝis venenigitajn trinkaĵojn. Plie, tiuj, kiuj uzis tiujn glasojn neniam suferis je konvulsioj kaj epilepsio. Oni konservis tiun kutimon ĝis Mezepoko. En la kortego de Karlo la 9-a kaj en tiu de Duko de Berri oni metis pecon de tiu korno en la glasojn de la Princoj por antaŭeviti venenadon. Laŭ arabaj tekstoj la Orientaj Princoj fabrikigis tranĉil-prenilojn el ĝi, kiuj kovriĝis je ŝvito, kiam ili tranĉis venenigitajn manĝaĵojn. La tiamaj Moŝtuloj havigis al si orpreze, tiujn kornojn. En 1588 la Brita Reĝo posedis la plej dikajn. Ilin oni ankaŭ vidis en preĝejoj (S-t Denis, Metz, Strasbourg, Venecio).

Simbolismo de la Unukornulo

Ĉie oni atribuis al la unukornulo samajn kvalitojn. Rapidegeco : ĝi kuras tiel rapide, ke neniu besto povas ĝin atingi. Sovaĝeco : laŭ S-ta Gregoro, ĝi estas tiel fiera, ke ĝi ne akceptas kaptitecon : ĝi mortas pro ĉagreno. Pureco : en ĉiuj legendoj — de 5 000 jaroj — ĝi simbolas la purecon. En la Brita blazono la Leono, kiu reprezentas la instinktajn fortojn de la Naturo, vid-al-vidas la Unukornulon. Tiu ĉi memorigas la purecon de la keltaj Druidaj Iniciitoj, la unuaj civilizantoj de la Insulo. La korno, kiun la besto portas sur la frunto figura la Dian forton, kiu malsupreniras en ĝin. En la Antikveco la kornoj simbolis tiun energion, donita de Dio al la ĉefoj, al la popoloj-kondukantoj, energion, kiun ilia pinto altiris laŭ la elektro-leĝoj. Moseo en Sinajo portis lumajn kornojn, montrantajn lian rolon de mediacianto inter la Ĉielo kaj la Homoj. Tiun unukornulan simbolismon ankaŭ respektis la Mezepokaj episkopoj ; ili fabrikigis sian episkopan bastonon el ĝia korno (sendube narvala korno).



Rigardante la kuntorditan kornon de la unukornulo, oni ne povas ne pensi pri tiu volviĝanta serpento, kiu figuras en tiom da tradicioj : la kaduceo de Merkuro-Hermeso, la « Givro » de la Keltoj, kiu kunigis la ĉielon kun la homo ; eĉ la du fajro-serpentoj, « Ida kaj Pingala », interplektitaj ĉirkaŭ la homa spino.

Neniu povas apudesti la unukornulon, krom virgulino, pura eĉ de sentoj. Tiuokaze la besto kuŝiĝas piede de ŝi kaj metas sian kapon sur ŝian bruston. En la 12-a jarcento, Filipo de Thaon precizigas, ke la junulino devas malagrafi sian korsaĵon kaj lasi unu mamon nuda. Sed, se la junulino estas koruptita kaj ne virga, la besto ŝin buĉadas kaj forkuras. Kiam la besto kuŝas piede de la Belulino, la ĉasistoj povas ĝin mortigi por proprigi al si ĝian panacean kornon.

Nur malofte la unukornulo estas rajdato ; tiam ĝi helpas la homon en lia lukto kontraŭ la Dragono ; la rajdanto estas aŭ viro nuda kaj haraĵa aŭ virino kovrita de plumoj kaj kronita de sensitivoj, simboloj de ĉasteco (dum la malĉastulino rajdas sur cervo). Sur la miniaturo de Jean Colombe en la Horoj de Chantilly, la rajdanto estas la Morto.

La Damo kun la Unukornulo

Inter la mezepokaj tapiŝoj, la « Mil Floroj » estas la plej plaĉaj ; inter ili la Domo kun la Unukornulo estas ensemblo de 6 tapiŝoj — antaŭe en la kastelo de Boussac, kaj nun en la muzeo Cluny. — Ili portas la blazonon de Jean Le Viste el liona deveno, kiu ellaborigis ilin ĉirkaŭ la 1 500-a jaro. Malhela insuleto reliefiĝas sur la ruĝa fono (sed roza por unu el ili) kaj servas kiel platformo al la sceno reprezentita. Sur tiuj tapiŝoj la Damo sidas, sed plej ofte staras, en la centro. Estas la sama svelta persono, riĉe vestita je veluro kaj brokaĵo, sur kiuj brilas riĉaj juveloj. La multaj floroj, la bestoj estas detale kaj poezie reprezentitaj. La delikateco kaj la eleganteco de la desegno, la beleco de la lumaj koloroj, atestas la grandan arton de la kartono-desegnisto kaj de la teksisto.

Al tiu Damo oni atribuis diversajn simbolojn ; oni vidis en ŝi la Virgulino-Patrino, Reĝino de la ĉielo, Reĝino de la kosma mondo ; en unu el tiuj scenoj, ŝi tenas en unu mano la flageto-stangon kovritan de krescentoj ; tiu flago estas la emblemo de la luna mondo, reĝejo de la demiurgo ; en la alia mano ŝi tenas la kornon, kiu ricevas la dian energion ; super tiu korno troviĝas simio hundo-kapa, suna emblemo de la Egiptoj. En alia sceno la Damo tenas spegulon, en kiu ŝi rigardas la spegulig̃on de la unukornulo, kiun ŝi ne tuŝas. Tio memorigas al ni la batalon de Perseo kontraŭ Meduza ; Perseo rigardis ŝin en sia ŝildo — donacita de Atena — polurita kiel spegulo ; li estus ne povinta elporti la rektan vidadon de tiu suna Gorgona.

La kristanisma mitologio akceptis la miljaran unukornulon ; ĝi iĝis la emblemo de Jesuo elektanta la sinon de sia Patrino. La Virgulino Maria anstataŭis la kosman Virgulinon ; tiu Damo kun la unukornulo estis la legebla bildo de la Anonco kaj Revelacio ; la korno simbolis la sunan radion, la Sanktan Spiriton kaj la filakteron sur kiu, kutime, estis la vortoj, kiuj anoncas al Maria ŝian feliĉan eventon.

Cetere tiu mito, longtempe antaŭ tiuj tapiŝoj, estis traktita en 13-a jarcenta romano. Antaŭ ol Racio foraperigu ĝin en la mitajn Bestarojn, la unukornulo vivis en la Edeno, kun la aliaj precipaj bestoj ; ĝi figuras en la Tera Paradizo de multaj dokumentoj, interalie en la Biblio de Petrus Comestor (1499). La vid-al-vidaj unukornuloj estas la duobla simbolo de Virgeco kaj Patrineco, la dilemo de la Virgulino Maria.

Jung kaj la psikanalizistoj vidas en la korno de la unukornulo « falusan » simbolon. Tiu erotika interpretado jam ekzistis en malnovaj skribaĵoj. En 1967 Hocke diras : « Inter 1520 kaj 1650 la mito de la unukornulo estis pure erotika. En unu studaĵo de Vinci la teologia karaktero tute malaperis ; oni opiniis tiun nervan kaj tremantan desegnon metaforo de la sodomismo ». Tiu interpretado kondukos al la mito de Leda kun la Cigno. Hocke citas la strangajn unukornulojn de la Kastelo S-ta-Anĝelo ; ili lasas nenian dubon pri la rolo de tiu besta korno. Tiuj neĉastaj bestoj jam anoncas tiujn, kiujn la modernaj poetoj kaj pentristoj ne mankis honori (Cocteau, Dali, Lorca). En 1966 Andre Masson pentris unukornulojn, sed ventre tranĉitaj de buĉistoj.


Alia simbolo en la libro de Bertrand d'Astorg (1963). Li montras la rilaton de tiu mito erotika-mistika kun la Mezepoka koncepto de la Galanta Amo, laŭ kiu la unukornulo simbolas tiujn Grandajn Amantinojn, kiuj rifuzas la plenumadon de la Amo, kiun ili inspiras kaj sentas. Estas la sublimigado de la Amo.

La alkemiistoj, inter kiuj Fulcanelli, konsideras tiujn tapiŝojn kiel ĉefverkon de la hermetika arto de la 15-a jarcento ; la blanka leono estas la tero, la fiksaĵo, la filozofia sulfuro ; la unukornulo estas la Reĝino de la ĉielo, la Pureco kaj samtempe la mistera ina agento sen kiu nenia ago povas efektiviĝi ; la besto estas la lumo maskiĝanta el la hidrargo ; la sceno simbolas la dian amon, kiu unuigas la Teron al la Ĉielo ; estas la ĉasta incesto de la sulfuro kun la hidrago.

El la libroj de P. Clebert kaj Duchaussoy.

POR VIA DISTRO

SOLVO DE LA ANTAŬA PROBLEMO



NOVAJ PROBLEMOJ

Kiom da gajnintoj ?

Iu gazeto publikigis enigmon. Ĝi donis 10 fotografaĵojn de 5 ĝemeloj, kaj la legantoj devis kunigi la ĝustajn parojn. La redaktoro tiom ĝojis pro la 123 respondoj, ke li decidis men elserĉi, kiom da tute bonaj solvoj li ricevis, kaj kiom da solvoj estis nur parte bonaj. Li do unue faris plurajn amasetojn. En la unuan li metis la solvojn, kiuj envahis nur unu bonan paron, en la duan li metis tiujn, kiuj envahis du bonajn parojn, k.t.p. Nombrante la diversajn grupojn, li konstatis, ke 12 solvintoj trovis nur unu bonan paron, 34 trovis du bonajn parojn, 56 trovis tri bonajn parojn. Sed nun okazis katastrofo. Iu frapis sur la pordon. Li ekstaris por malfermi ĝin. Estis lia edzino, sed la subita forta trablovo kaŭzis, ke pluraj solvoj de la diversaj grupoj forflugis de lia skribtablo tra la malfermita fenestro de la kvina etaĝo, antaŭ kiu li estis sidinta. Kia embaraso por li, ĉu ne ? Ĉar kiel li nun povis publikigi, kiom da solvintoj trovis ĉiujn bonajn parojn kaj kial ? Kiu povas helpi la malfeliĉulon ?

Vorto-ĉeno

Serĉu 13 vortojn, kiuj sinsekve konsistas el 3, 4, 5, 6, 7, 8, 9, 8, 7, 6, 5, 4, 3 literoj. La dua vorto enhavu la 3 literojn de la unua + kvara litero, la tria vorto enhavu la 4 literojn de la dua + kvina litero, ktp., la oka vorto enhavu la 9 literojn de la sepa minus unu litero, la naŭa vorto enhavu la 8 literojn de la oka minus unu litero, ktp. Ĉiuj vortoj estu diferencaj. Konsilo : Klopodu trovi unue taŭgan mezan vorton.

Kaŝita proverbo

El la vortoj : ŝalupo, prologo, rimarki, oni povas fari novan trisilaban sepliteran vorton : marŝalo, prenante po unu silabo el la tri donitaj vortoj. Agu tiel kun la sekvantaj trioj da vortoj, tiel ke la mezaj literoj de la novaj vortoj formu proverbon.

suspekti-piastro-prestiĝo ; pardoni-ĉagreni - najado ; poluri - manovri - frizisto ; barakti-kolombo-solena ; soriko-perturbo-markizo ; legomo-nufaro-siringo ; marĝeno-pedanta-karato ; cigano - padeli - nuncio ; rabato - penetri - kobalto ; lozanĝo - pasero - rajtigi ; kojoto - absinto - romanco ; kolimbo-arbitra-agrafi ; timono - kadeto - kolbaso ; agrabla - detalo - dilemo ; grafito - maristo - veturi ; ĝemelo-hetmano-bonŝanco ; fekunda-dolaro-selakto.

GRAMATIKO PER BONHUMORO

INFINITIVO (LR 113 - 128)

DIFINO (PIV) Esti aŭ ne Esti ?
Infinitivo povas roli kiel :

Predikato : ne fumi — planti en tia aĝo !


Subjekto : kritiki estas facile (ĝia predikativo estas Adverbo).

Suplemento : mi estas inklina akcepti vian propronon.

Predikativo : flati al iu ne estas servi al iu.

Verba komplemento : « Oni uzas infinitivon nur en formo de **Rekta komplemento** (mi amas danci) aŭ en formo de **Nerekta Komplemento** kun **Anstataŭ, Antaŭ ol,** kiuj rolas kiel subjunkcioj kaj **POR,** kiu montras **Celon** de de la ago.
(Vi dormas anstataŭ labori — antaŭ ol foriri li manĝis — mi serĉas korktirilon por malŝtopi la botelon).

Por anstataŭi la aliajn prepoziciojn oni uzas la Participon aŭ la Substantivon de la infinitivo :
— promeninte (post promenado) en la arbaro li rapide revenis
— esprimante sian indignon li foriris (dum la esprimado de)




Decidiĝi estas malfacile

Kion fari ? antaŭ ol akcepti duonigon de mia personeco nepre necesas, ke mi decidiĝu : ĉu mi estas ema dekstruliĝi aŭ maldekstruliĝi ?


Rimarko pri SEN (PIV)

Oni trovas kelkfoje : li venis sen manĝi.
Tiu formo permesas precizigon :
— ne parolante pri versarto mi ne analizos ĝin (ĉar mi tute ne parolos pri ĝi),
— sen paroli pri versarto, la tie esprimita ideo estas admirinda (sed ankaŭ admirinda estas la versarto).



Sen ia dubo

Lasi post si tian malordon ! tute ne dubante mi asertas, ke estas Ludoviko. Li neniam klopodis por ordigi siajn aferojn ; eĉ ĉe decidiga renkonto.



Por delikate riproĉi la edzon

Dum niaj aŭtoveturadoj, anstataŭ aĉe riproĉi mian malbonan stiradon, mia edzino — laŭ la graveco de miaj eraroj — kantetas, kantas aŭ kantegas. Sen ĝeno por mi, ĉar mi havas ŝtopilojn en la oreloj. Bedaŭrinde, re-hejmenirinte, voĉperdon suferas mia edzino.

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (120 aŭstr. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 18, rue Chefneux. BARCHON, Lg. (220 fr.).

Britujo : S-ro John Rapley, 156, Wanstead Park Rd., ILFORD, Essex IGI 3 TP, ĝiro 50 292 3008 (50 pencoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (35 kr.).

Finnlando : S-ro Jussi Jäntti, Esperantotie 4, SF 02220 IRISLAHTI (23 mk).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (15 mk.).

Hispanujo : S-ro Manuel Romero Gomez, Arzobispo Apaolaza, 32-Ent. A ZARAGOZA (320 pes.)

Italio : S-ro Gaudenzio Pisoni, via Benedetto Affieri, 24, 28100 NOVARA — p.ĉ. 23/16532 (2 500 lires).

Japanujo : S-ro Tara Nišiumi, 6-31-19 Kita-Koiwa Edogawa-Ku, 133, TOKIO - pĉ Tokio 44163 (1 800 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (80 d.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk. 209721 (15 guld.).

Norvegujo : S-ino Marit Delor, Solveïen 143-B, LJAN (30 kr.).

Peruo : S-ino Skotte, Malecon Paul-Harris, 336, Dto 200 BARRANCO (Lima).

Pollando : Pola Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO.

Rumanio : S-ro Adrian Boldan, al. Valea Rosie 4, ap. 69, B.P. 8/4 BUKURESTI - 66.

Sovetunio : S-ro Alik Melnikov, ab jaŝ 233 Rostov Don — 7.

Svedujo : ESPERANTOFORLAGET, Fack. 200 42 MALMO 7, ĝiro 578 (24 kr.).

Svislando : S-ro Cl. Gacond, Miéville, 133 - 2314 LA SAGNE (20 fr.).

Tajlando : S-ro C.L. Unchitti, GPO Box 1231, BANGKOK (6 us. dol.).

Usono : S-ro D.W. Hoffman, 1444 Leslie Street, HILLSIDE (N.J.) (6 dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per respondkuponoj (20 respk.).



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier — Le Gérant : P. BABIN

Supplément au n° 5 de 1975, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

Avec une participation de 60 à 120 personnes, l'été 1975 a connu un succès plus grand que l'été précédent. Les résultats financiers s'en ressentiront et quelques travaux laissés en suspens vont pouvoir être réalisés.

La première période a été la plus « peuplée ». Les stagiaires I.C.E.M. se sont parfaitement intégrés à la collectivité qui a beaucoup profité de leurs apports, et on peut dire que ce premier stage a été très satisfaisant. Un ami britannique a même dit qu'il n'avait pas vu depuis longtemps autant de jeunes à l'occasion d'une rencontre esperantiste. Si le nombre des candidats aux examens a été réduit, les cours ont été suivis par les français et les étrangers présents. Les conférences de la 2e période ont réuni chaque matin de 20 à 30 auditeurs, le nombre total des participants étant de 70. Ces conférences ont été suivies de débats souvent très animés, toujours intéressants. La 3e période a connu une affluence moyenne de 60 personnes. Les cours ont été très suivis et les sessions d'examens plus « étoffées » qu'à la première période. Cette dernière période a été particulièrement familiale puisque des recettes culinaires originales proposées par des stagiaires ont été réalisées à la cuisine pour tout le monde.

En résumé, l'ensemble des stages a été réussi. Certains stagiaires nous font part de leurs idées concernant la Maison et les stages. Nous tenons toujours compte, à plus ou moins longue échéance, des suggestions qui nous paraissent valables, qui parfois s'inscrivent dans un ensemble prévu et supposent des réalisations préalables. Nous accueillons parfois avec moins de plaisir des initiatives qui partent du désir sincère d'apporter une aide, mais qui vont parfois à l'encontre des réalisations en cours ou projetées. Il est plus prudent de proposer un travail qu'on pense nécessaire plutôt que d'essayer de faire une bonne surprise.

Il ne nous reste plus qu'à faire en sorte que l'année 1976 soit au moins aussi bonne que l'année 1975.

P. BABIN.

LA REVUE

La fin de l'année approche. Nous avons fait le service de la revue en 1975 à tous nos abonnés de 1974. Tous n'ont pas réglé leur abonnennement de cette année. Qu'ils le fassent vite, ou qu'ils soient assez gentils pour nous prévenir s'ils ne veulent plus s'abonner. L'impression de Kulturaj Kajeroj coûte très chère : l'abonnement simple couvre à peine nos frais. Nous ne pouvons pas nous permettre de largesses. Merci !

—★—

ABONNES BIENFAITEURS

Mme Rousselle (44)	20,00
Mlle Mauchien (80)	30,00
M. Ciret (49)	20,00
Mme Jacquesson (86)	20,00
M. Mathé (86)	20,00
M. Labatte (80)	20,00
Mme Lecomte (49)	25,00
M. Diez (34)	20,00
M. Bernard (92)	20,00
F-ino Rinke (All. Féd.)	20,00
M. Lahaye (10)	20,00
Mme Chassiau (10)	20,00
Mme Lenel (22)	20,00
Mme Poisson (37)	20,00
M. Le Marchand (76)	20,00
M. Le Magadure (56)	20,00
M. Lentaigne (34)	20,00
M. Linardt (49)	30,00
Mme Bentz (31)	20,00
Mlle Vanneau (75)	20,00
Mlle Drillien (71)	20,00
Mme Vergnac (47)	20,00
Mme Mouneyrou (47)	20,00
S-ino Plazotta (Autriche)	20,00
M. Ribot (47)	20,00
S-ro Pieterse (Pays-Bas)	20,00
M. Sanié (13)	20,00
M. Lenoir (06)	20,00
M. Tricoire (44)	20,00
M. Bénaïm (47)	20,00
Mlle Turbillon (37)	20,00
M. Gitton (18)	20,00
Esp. Rondo Arras (62)	20,00
Mme Micard (53)	40,00
Mme Jacquesson (72)	20,00
S-ro Polisĉuk (URSS)	20,00
M. Miquel (01)	25,00
M. Melo (37)	20,00
Mme Grisier (03)	20,00
Mlle Benoit (38)	20,00
Mme Rey (69)	30,00
TOTAL	880,00

—★—

NOS PEINES

La mère de M. Ciret, responsable de notre Libro-Servo est décédée au début du mois de juillet. Tous leurs nombreux amis présentent à M. et Mme Ciret leurs très sincères condoléances.

Nous avons appris le décès, en août, de Louis Apcher. Ami des premiers jours de la M.C.E., auteur d'un cours par correspondance utilisé pendant longtemps par le G.E.E., professeur au lycée de Meknes pendant de nombreuses années, Louis Apcher, en raison d'une cécité presque totale, avait beaucoup diminué ses activités. Que Mme Apcher trouve ici l'expression de notre profonde sympathie.

—★—

RESULTATS DES EXAMENS

Ont été reçus :

Atesto pri lernado : Augustin André, Batllori-Rafecas Jean, Bertho Annick, Cortaza Michel, Glady Claude, Grimme Steffen, Grisard Evelyne, Mas Emile, Mauvignant Jeanne-Marie, Melton Hilda, Pauwels Raymond, Pérault Raymonde, Quennehen Nicole, Roger Danièle, Sanié Lucie, Thibé Jacques, Thon Dominique, Thon Geneviève, Thon Germain.

Atesto pri praktika lernado : Dejean Nicole, Fontanier Paul, Gente Mireille, Grisard Evelyne, Lenoir Fernande, Mas Emile, Mauvignant Jeanne-Marie, Thibé Jacques.

Les résultats de l'Atesto pri kapableco ne nous sont pas encore parvenus.

Félicitations à tous les lauréats !

SERVICE - LIBRAIRIE

Adresser commandes à :
M. CIRET, route de la Boulerie, Le Vieil-Baugé, 49150 BAUGÉ

Chèque de paiement à :
MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE, 49 - Baugé — C.C.P. Nantes 1485-39

Prix franco au-dessus de 20,00 Fr.
(au-dessous de la somme ajouter 15 %)

LIVRES D'ÉTUDE ET DISQUES

ABC d'esperanto (Waringhien)	4,00
Esperanto por Infanoj	3,00
Falsaj amikoj	3,50
Gvidlibro por ekzamenoj	3,00
Junulkurso (complément)	3,00
Junulkurso (SAT-amikaro)	10,00
Junulkurso : 5 disques d'accompagnement	15,00
Manuel d'Initiation (Thaillet)	2,50
Manuel d'Etude (Couteaux)	4,80
Manuel de perfectionnement (Couteaux)	4,50
Manuel de préparation à l'Atesto pri Kapableco (Ribot)	8,00
Korektoj	5,00
Nouveau Cours Rationel et Complet (S.A.T.)	17,50
Ni parolu en Esperanto (Ribot)	6,00
Nos premiers pas en Esperanto (avec disque)	3,00
Paŝoj al plena posedo (Auld)	18,00
Por la praktikantoj (Babin)	10,00
Premier Manuel	3,00
Tra la Mondo : 6 disques, 7 livrets	86,70
disques seuls	42,00
livrets seuls	48,00
Ludoviko en Nederlando (Delaire). Supera Kurso	35,00

DICTIONNAIRES

Dictionnaire pratique (esp.-fr., fr.-esp.) nova eldono	25,00
Dictionnaire pratique	18,00
Dictionnaire français-esperanto (Léger-Albault)	23,00
Grand dictionnaire esper.-français (Waringhien)	40,00
Lexique fondamental (Léger)	6,50
Naŭlingva etimologia leksikono (Bastien)	18,00
Plena Vortaro : malnova eldono	17,00
nova eldono	25,00
Plena ilustrita vortaro	150,00
Règlement examens	1,00
Vocabulaire (Duc. Goninaz)	12,00

LANGUE ET MOUVEMENT

Bona ŝanco (W. Borman)	28,00
Dialekto, dialektiko (Dalmau)	4,00
Dr Esperanto (Ziokowska) broché	7,00
relié	14,50
Elektitaj paroladoj (Lapenna)	25,00
Esperanto dans l'enseignement	3,00
Esperanto en perspektivo	170,00
Fundamento de Esperanto relié	18,50
broché	14,00
Une langue internationale	4,00
Une humanité, une langue (S. Glodeau)	3,50
Leteroj de Zamenhof (2 vol.)	35,00
Lingvaj respondoj (Zamenhof) relié	11,00
broché	8,50
Naskiĝo de Esperanto-Domo	5,00
Retoriko	30,00
Vivo de Zamenhof (Privat)	10,00
Vojoĝo inter la tempoj (Kalocsay)	18,00
Zamenhofa Esperanto (ata-ita)	20,00
Zamenhof (M. Boulton)	17,00
Zamenhof en sia tempo :	
Boulogne - 1905	2,60
Homaranismo	2,60
Aŭtografoj de Zamenhof	2,60

LITTÉRATURE

Amuzzj dialogoj (Lienhardt)	10,00
Amara pano (Darvas)	8,00
Aventuroj de pioniro (Privat)	12,00
El tero kaj etero (Pioro)	10,00
El la vivo de Bervala/sentaŭgulo (Beaucaire)	18,00
Fabeloj de Andersen	20,00
Fundamenta Krestomatio	18,00
Gaja leganto (Schwerin)	3,00
Homoj sur la tero (Engholm) broché	12,00
relié	16,00
Invit' al Japanesko	12,00
Japana kvodlibeto	12,00
Junaĝa verkaro (Privat)	10,00
Kanako el Kananam (Linton)	12,00
Karlo (Privat)	3,50
Karnavalo kaj Somnambulino (Immermann)	5,00
Kiso de l'reĝino (Najibin)	5,00
Kombilo (Gabrielli)	4,50
Konversacia Literaturo	3,00
Kredu min sinjorino (C. Rosetti)	12,00
Kuŝanta tigro	5,00
Malsata ŝtono (Tagore)	20,00
Maŝinmondo (Szathmari)	12,00
Marta (Orzesko - tr. Zamenhof)	20,00
Martin Fiero	25,00
Marvirineto (Andersen)	15,00
Maskerado ĉirkaŭ la morto (Schwartz)	20,00
Mi amis junulinon (Trobisch)	9,00
Mi estas Pele	28,00
Naŭzo (Sartre)	20,00
Ne plu ludo (Barthelmes)	10,00
Ni kaj ĝi (Waringhien)	30,00
Normandaj rakontoj (Maupassant)	28,00
Novaj vestoj de l'Imperiesto (Andersen)	15,00
Nudaj inter lupoj	28,00
Okuloj (Boulton)	12,00
Okupacio	5,00
Printempo de morto (Zihaly)	10,00
Profeto	7,00
Romeo Julieta kaj la tenebro	12,00
Sankta Biblio	35,00
Specimene (Baupierre)	10,00
Sub la jugo	17,00
Taglibro de Ann Frank	16,00
Tartarin de Taraskono (Daudet)	12,00
Tridek tri rakontoj	20,00
Tri verkoj de Volter	13,00
Vitralo (Francis)	8,00
Vivo kaj opinioj de Majstro M'Saud (Ribillard)	15,00
Vivo vokas (Engholm)	10,00
Vojaĝo al Kazohinio (Szathmari)	15,00

POÉSIE — THÉATRE

Arĉoj (G. Mattos)	10,00
Cigana romancaro (F. Garcia Lonca)	13,00
Ĉielarko (Baghy)	8,50
Dia Komedio (Dante)	90,00
Duonvoĉe (Maura)	10,00
Ekzilo kaj Azilo (Emba)	10,00
Eroj (M. Boulton)	20,00
Esperanta antologio (bindita)	30,00
Eta vivo	12,00
Fajro sur mia lango (de Kock)	10,00
Ĝoja podio (Schwartz)	12,00
Gajaj edzinoj de Windsor (Shakespeare)	3,00
Georgo Dandin (Molière)	5,00
Hamleto (Shakespeare ; trad. Newell)	15,00
Hamleto (trad. Zamenhof)	15,00
Humoroj (Auld)	12,00
Infana raso (W. Auld)	10,00
Invit' al japanesko	14,00
Kantoj kaj Romancoj (Heine)	32,00
Kontralte (Boulton)	12,00
Krioj el Mallumo (Svetinov)	10,00
Libro de amo (Peneter)	35,00
Mokindaj preciozulinoj	3,00
Norda Naturo (H. Dreseu)	12,00
Nova Ezopo (Urban)	10,00
Nur tri koloroj (Urbanova)	10,00
Parnasa gvidlibro	15,00
Peer Gynt (Ibsen) relié	12,50
Pinta krajono (Rossetti)	10,00
Somermeznokta sonĝo (Shakespeare)	15,00
Provo alfronti la vivon (Georgiev)	10,00
Revizoro (Gogol)	6,00
Romeo kaj Julieto (Shakespeare)	3,00
Rozoj kaj Urtikoj (Thorsen)	12,00
Sen eliro — La respektema P... (Sartre)	12,00
Sen paraŝuto (Thorsen)	10,00
Soifo (Tarkony)	14,00
Sub stelo rigida (Hamri)	10,00
Sur la vivovojo (Logvin)	10,00
Ŝtupoj sen nomoj (Ragnarsson)	10,00
Tempesto (Shakespeare)	12,00
Topaze (Pagnol)	12,00
Unufingraj melodioj (Auld)	10,00
Vesperkanto (Adamson)	10,00
Virino ĉe la landlimo (Boulton)	18,00
Vojo kaj vorto (Nogveira)	15,00

HISTOIRE — GÉOGRAPHIE SCIENCES — VOYAGES

Aktualaj problemoj (I. Lapenna)	12,00
Atakoj kontraŭ ĝardenplantoj (Neergaard)	17,00
Bela subtera mondo (Tell)	12,00
La dolĉa Franclando	28,00
Dorse kontraŭ la muro (Wybenga) relié	24,00
broché	15,00
De Parizo al Lazura marbordo	3,50
El la polvo de la tero	10,00
Elingita glavo (Verdiro)	7,00
Gvidlibro tra Parizo (Julieta)	13,00
Internacia kuirlibro	15,00
Kon Tiki (Heyerdahl)	20,00
Nobla korano	70,00
Planlingvaj problemoj	12,00
Princlando Andoro	9,00
Rakontoj pri Nederlando (Duhamel)	5,00
Sekretoj de la marestaĵoj	15,00
Senĝenaj dialogoj (Fernandez)	22,00
Tio, kion mi kredas (J. Rostand)	3,00
Vivo de Gandhi (E. Privat)	12,00

DIVERS

Gaja kantaro	3,00
Comment former un centre culturel	3,00
Cartes postales de Grésillon noires	0,50
couleurs	0,70
Cuillers souvenirs	12,00
Coupe-papier souvenir	12,00
Badge « Grésillon » pour blousons	3,00
Vignettes « Grésillon » (les 10)	1,50
Esperanto kaj stelo (ovala glumarka)	1,50
Disque de stationnement	4,00
Insigno (stelo) pinglo aŭ broĉo	3,00

NOS COURS PAR CORRESPONDANCE

Cours 1er degré. — 16 livrets illustrés qui permettent d'acquérir les bases essentielles de la langue. Cours et corrections : 60,00 F.

Cours 2e degré. — 14 leçons présentées sous forme de feuillets. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue. Cours et corrections : 60,00 F.

Cours 3e degré. — Excellent entraînement à un cours supérieur : versions, thèmes, étude de textes. Cours et corrections : 40,00 F. Nous pouvons fournir les livres de cours à ceux qui ne les possèdent pas déjà.

NOVAĴO

Tablo Kalendaro DATO'ROY de la XXe jarcento, ekskluziva luksaĵo por ornami skribotablon, indikas ĉiujn tagojn de la samajno dum periodo de 100 jaroj (1900-2000), tre praktika (16 × 10,5 centimetrojn) .. 50,00

POUR VOS COURS DE PERFECTIONNEMENT

Le livre qu'il vous faut :

POR LA PRAKTIKANTOJ

de P. Babin

Prix : **10,00 Fr.**